

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Mireille Grosjean

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj

de la aktuala numero:

Ismael Ávila

Nina Daniljuk

Annie Grente

Mireille Grosjean

Julián Hernández Angulo

Dennis Keefe

Ilona Koutny

Stefan MacGill

Suso Moinhos

Tiina Oittinen.

Usui Hiroyuki





Supre: Certe la kursoj en UAM ne estas tedaj (vd. p. 13).
Malsupre: Legu la artikolon de Julián Hernández Angulo (vd. p. 21) kaj
provu kongresumi kun li, li ĉarmos vin per sia bela voĉo.



Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford;
AdE¹

Vicprezidanto: Detlev Blanke,
Germanio, Prezidanto de la Societo
pri Interlingvistiko

Membroj:

Duncan Charters, Usono, Principia
College, Elsah

Renato Corsetti, Italio, Università
degli Studi di Roma „La Sapienza”;
AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, LRU,
Indian Statistical Institute, Kolkata;
AdE¹

Michel Duc Goninaz, Francio,
Université de Provence; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių
universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Piona Koutny, Pollando/Hungario,
Uniwersytet im. Adama
Mickiewicza w Poznaniu; AdE¹

Stefan MacGill, Nov-Zelando/
Hungario, vic-prez. de UEA

Aleksandr Melnikov, Rusio,
Академия Сельскохозяй-
ственного Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio,
Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

¹AdE – Akademio de Esperanto

Titolpaĝe:

*Flory WITDOECKT kaj Margaretha
SYMOENS invitas vin en Oostende.
(Fotis nekonata kunfestanta
persono)*

Enkonduko

Karaj legantoj!

Esperable ni baldaŭ renkontiĝos en Oostende (BE). Rigardu niajn du belgajn amikinojn Margaretha kaj Flory; vi povas imagi la gajan etoson, kiun ili preparas por ni. Ilia organiza laboro estas giganta, ĉar nia Konferenco estos giganta: jam nun aliĝis pli ol cent personoj. Jam nun ni scias pri tre internacia grupo. Sed antaŭ tiu evento vi havos la okazon progresi legante la jenan numeron de nia revuo: la teksto de Ismael AVILA prezentas al ni rimedon por progresi: retkurson el la sukcesa libro „Saluton” de Audrey CHILDS-MEE; mi prezentas al vi alian rimedon por progresi kaj malkovri la japanan kulturon: la lernolibron de Ĉieko DOI; Julian prezentas al ni metodon por progresi; mi prezentas al vi programon por progresi: temas pri E-Sumoo de Jasuo HORI. Finnaj gesamideanoj invitas vin por progresi en Turku en aŭgusto. Raportoj kaj invitoj aperas el diversaj mondopartoj, el Afriko sude de Saharo, el Norda Afriko, el Kroatio, el Ukrainio, el Japanio, el Pollando, el Ĉinio. Do legante la revuon, ni vojaĝos tra la mondo.

Ĉu AMO gravas nur en printempo? Certe ne. AMO okupas plurajn paĝojn de tiu ĉi numero. Kaj amikiĝo esperable kreskigos la sukceson de nia julia Konferenco.

Amike:

Mireille GROSJEAN, prez. de ILEI

ENHAVO

<i>Enkonduko</i> (Mireille GROSJEAN):	3
<i>Interreta versio de la kurso „Saluton! Esperanto Aŭtodidakte”</i> (Ismael ÁVILA)	5
<i>Bazaj universitataj studoj por Esperanto-instruistoj</i> (Ilona KOUTNY).....	13
<i>La Interlingvistikaj Studoj: interna vido</i> (Suso MOINHOS)	18
<i>ESPERANTO-SUMOO: Lukti kontraŭ si mem</i> (Mireille GROSJEAN)	20
<i>Strategioj por lerni fremdan aŭ negepatran lingvon</i> (J. HERNÁNDEZ ANGULO)	21
<i>Paroliga kurso en Hamameto</i> (Stefan MACGILL)	27
<i>Tempo-mastrumado pere de AMO</i> (Stefan MACGILL).....	28
<i>ILEI kaj UNESKO: AMO kaj SEVO, printempas....</i> (Mireille GROSJEAN).....	29
<i>Lernolibro kaj legolibro, ĝuinda verko</i> (recenzo de Mireille GROSJEAN).....	31
<i>El la landoj kaj sekcioj</i> (CN, FI, HR, TN, UA).....	33
<i>Ĉu korekti? – Kiel korekti? – Kiam korekti?</i> (Mireille GROSJEAN).....	36
<i>Renkontoj kun Diferenculoj</i> (recenzo de Dennis KEEFE).....	38
<i>Informoj pri ILEI</i>	40
<i>Redakciaj informoj</i>	42

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 7969 709 66. Rilatoj kun Unesko kaj FIPLV. Reprezentanto de ILEI ĉe UEA.

Vicprez.: Zsófia KÓRÓDY, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio. <zsofia.korody@esperanto.de>. Tel./fakso hejmaj: (+49) 5521-5983. E-centroj, ekzamenoj, ALTE.

Vicprez.: GONG Xiaofeng „Arko”, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN-330031 Nanchang, Ĉinio. <arko.gong@qq.com>. Universitatoj.

Estrarano pri financoj: William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.

Sekretario: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <ilei.sekretario@gmail.com> por sekretariaj aferoj, <radojica.petrovic.rs@gmail.com> alie. Tel. hejma (+381) 32 371053. Konferencoj, rilatoj kun TEJO.

Vicsekr.: Magdaléna FEIFIČOVÁ „Fejfi”, Bernoláková 25/5, SK-010 01 Žilina, Slovakio. <ilei.oficejo@gmail.com>. Membro-administrado. Rilatoj kun FEL.

Estrarano: Bharat GHIMIRE, G.P.O. Box 10518, Kathmandu, Nepalo. Tel. (+1) 620 9877. <nepa.1990@gmail.com>. Universitatoj. Komisiito por helpi al aliĝpetoj.

Estrarano: Enikő ZENGŐ SEREGHY, Dózsa u.14. 2/8, HU-4400 Nyíregyháza, Hungario. <enimyster@gmail.com>. Tel. portebla: (+ 36) 203234365.

Kalendaro, ekzamenoj, multlingva paĝaro www.ilei-mondo.info, varbado.

Estrarano: Penny VOS, Aŭstralio <penivos@yahoo.com>. Lerneja agado.

Interreta versio de la kurso „Saluton! Esperanto Aŭtodidakte”

oficiale lanĉita dum la Konferenco de ILEI en Montevideo

La 24-an de julio 2014, dum la Konferenco de ILEI en Montevideo, Ismael ÁVILA, kreinto de la interreta versio de tiu fama kurso, prelegis pri la apero de tiu ideo kaj la malfacilaĵoj sur la vojo de tiu disvolvado. Jen sube la detaloj de tiu multjara laboro.

Iom da historio

Inter la jaroj 1989 kaj 2000 la kurso *Saluton! Esperanto Aŭtodidakte*, de Audrey CHILDS-MEE, estis la plej furora titolo de la libroservo de UEA. Dum tiu periodo vendiĝis kelkaj miloj da ekzempleroj de tiu rekta metodo. Tia populareco estas en si mem indiko pri la kvalito de la lernilo, aŭ almenaŭ pri ĝia taŭgeco por certaj lernaj kunteksto.

Kiel la nomo de la kurso mem anoncas, unu el tiuj kunteksto estas la mem-lerna (aŭtodidakta) akirado de la lingvo, io pli kaj pli necesa en mondo, kie plej ofte mankas favoraj kondiĉoj por en-klasa instruado de Esperanto. Sed ankaŭ la uzo de *Saluton!* en ordinaraĵ klas-ĉambroj ne estis malofta.

Aliflanke, kiel fona fenomeno, dum la dek jaroj, en kiuj la kurso “Saluton!” plej furoris, okazis rapida populariĝo de Interreto. Tiel ke, iom post iom, tiu nova komunik-rimedo atingis preskaŭ la tutan mondon, ebligante aliron al multaj enhavo, inkluzive al edukaj materialoj.

Tiuj du paralelaj kaj sendependaj faktoj, nome, la relative granda populareco de la kurso *Saluton!* kaj la rapida disvastiĝo de la Reto, tiam kondukis al la ideo ekspluati la latentajn kapablojn de la kurso sur tiu nova tereno. Tiu ĉi teksto do resumas, kiel tiu ideo realiĝis dum la sekvaj jaroj kaj kiuj estis ĝis nun la unuaj rezultoj de tiu nova lernilo sur la Reto.



Kiuj estus la celoj de tiu projekto?

Estas klare, ke E-o celas ĉiujn homojn, sendepende de denaska kulturo, loĝloko kaj pagipovo. Koncerne kulturajn diferencojn, unu el la plej interesaj kvalitoj de la kurso estas ĝuste ĝia rekta metodo, forte bazita sur bildoj. Tiu simpla aspekto ebligas, ke la samaj instruaĵoj estu uzataj ie ajn en la mondo, sen la neceso traduki la kurson al diversaj lingvoj. Tio estas ne nur konvena el disvolva vidpunkto, sed ankaŭ pli justa, ĉar kiam oni tradukas instru-materialojn al diversaj lingvoj, tre ofte minoritataj lingvoj estas neglektataj.



Rilate al la pagipovo de la lernantoj, estas menciinde, ke la libro-forma kurso kostas ĉirkaŭ 11 eŭrojn kaj, supozeble, estis aĉetita nur de tiuj, kiuj povas pagi tian monsumon. Bedaŭrinde ne ĉiuj en la mondo povas aŭ emas tion fari. Do grava pravigo por la interreta versio estas ankaŭ la fakto, ke sur la Reto la kurso povas esti tute senpaga kaj, pro tio, esti pli juste dissendata tra la mondo.

Tiel en sia nova interreta versio la kurso povas esti uzata de homoj en iu ajn lando, eĉ tie, kie ne estas instruistoj, libro-perantoj aŭ Esperanto-bibliotekoj. Laste sed ne balaste, en multaj kazoj interreta kurso ebligas privatan en-hejman lernadon de la lingvo tiamaniere, ke oni ne tuj submetiĝas al la iom malfavora sinteno de la socioj rilate al E-o.

Jen do eble la ĉefaj *strategiaj* kialoj por entrepreni tiun adaptadon de la kurso. Sed krom ili oni povas ankaŭ mencii *kapabligajn* motivojn, kiel la volo esplori teknikajn kaj pedagogiajn aspektojn de tiu adaptado cele al ĝia sekva ripetado por aliaj bonaj lingvo-lernigaj metodoj.

Ĉefaj decidoj kaj kompromisoj en la bitigo de la kurso

Do la komenca decido transporti precize la kurson *Saluton!* al la Reto estis almenaŭ racie pravigebla, sed ankoraŭ necesis decidi, kiel profunde iri en la Reton. Simple alŝuti ciferigitan kopion de la libro estus la plej simpla alternativo, sed certe tio ne sufiĉus por ekspluati ĉiujn eblecojn de la nova medio. Do la transformo devus esti pli profunda kaj komenciĝis kun la kreado de hipertekstaj paĝoj, enhavantaj la tekstojn kaj la ciferigitajn bildojn de la kurso. Tiu laboro estis relative simpla, sen grandaj teknikaj defioj, sed aliflanke tre longa pro tio, ke la kurso ampleksas ĉirkaŭ 200 paĝojn.

La transiro de papera al bita formo ebligis ankaŭ riĉigojn kiel la kolorigon de la bildoj. Tio povas ŝajni bagatelo, sed ne estas ia dubo, ke, por instrui pri „blua ĉielo” aŭ „verda trafik-lumo”, pli efikas havi la bildojn kun la koncernaj koloroj ol havi ilin en nuancoj de grizo. Tiun evidentan avantaĝon la presitaj kursoj malofte povas havi nur pro tio, ke la kosto por eldonado de multkolora libro povus fariĝi tro granda eĉ por pagipova publiko.

La komputila medio solvas ne nur la mankon de koloroj, sed ebligas eĉ la aldonon de movoj al kelkaj bildoj, precipe se tio konvenas por pliklarigi koncepton, kiel verbon. Reprenante la ekzemplon de la trafik-lumo, de originala papera bildo kun nemoviĝantaj aŭtoj antaŭ nigre-blanka trafik-lumo, la komputila versio povis evolui al moviĝantaj aŭtoj antaŭ flagrante verda trafik-lumo, multe pli kongrua kun la apuda teksto: „La verda lumo brilas kaj la aŭtoj iras”.

Tamen, aspekto nemalhavebla por efika lingvo-kurso estas la sonoj, nome, la ekzisto de prononcaj modeloj de la lernata lingvo. En la presita kurso tio parte solviĝis per la eldono de aparta kasedo (kostanta pliajn 8 eŭrojn) kun kelkaj prononcaj modeloj. Tamen, se dum la furora periodo de *Saluton!* plej ofte la aĉetantoj de la libro simple preteratentis la ekziston de la kasedo, nuntempe la uzo mem de kasedoj preskaŭ tute malaperis. Tiel restas al la uzantoj de la presita metodo la alternativo klopodi deĉifri la Esperantajn fonemojn surbaze de desegnitaj buŝaj ekzemploj aŭ de prezentata komparo kun anglalingvaj fonemoj.

98

◀ Kovrilo

◀ Paĝo 97

Paĝo 99 ▶

paĝo [naŭdek ok](#)

[Indekso](#) ▶▶



Kioma horo estas?

a) Estas kvin (minutoj) post la dua.

b) Estas () antaŭ la tria.

c) Estas ()

e) Estas ()

Estas dek (minutoj) antaŭ la naŭa.

Minuto, horo, tago, semajno, monato kaj jaro estas partoj de la tempo.

Ankaŭ tiun aspekton la komputila versio ebligis solvi espereble pli kontentige, simple ĉar ĝia multrimeda naturo pretas por la kunekzistado de tekstoj kaj sonoj sur la hipertekstaj paĝoj. Sed ĝuste tie komenciĝis la plej malfacilaj teknikaj defioj por la projekto: la solvoj tiam ekzistantaj por mastrumi sonojn sur Interretaj paĝoj forte dependis de krozilaj tipoj kaj versioj, tiel ke solvo povus funkcii perfekte por *Chrome* kaj *Internet Explorer*, sed tute fuŝi por *Firefox*, *Safari* kaj *Opera*, aŭ inverse. Tiu teknika obstaklo baris la antaŭeniron de la projekto dum pli ol unu jaro, sed finfine antaŭ kvin jaroj lanĉiĝis kontentiga son-mastruma solvo por Interretaj paĝoj. Ĝi konvene kreas facilan kaj aŭtomatan konekton inter tekstoj kaj sonoj kaj, plej grave, per rimedoj samtempe taŭgaj por ĉiuj kroziloj.

La solvon de la sonmastruma problemo sekvis tamen nova defio, nome, kiel produkti la son-dosierojn kun la prononcaj modeloj por la pli ol du mil

vortoj, frazoj kaj tekstoj de la kurso? La unua ideo estis uzi hejman solvon, nome, la voĉojn de mia familio. Tio montriĝis malfacila kaj nesufiĉe taŭga por modela prononcado, inter aliaj kialoj pro la neprofesieco de niaj voĉoj, nia tro mola akĉento kaj la manko de bonkvalitaj sonaparatoj en nia hejmo. Malhelpis ankaŭ la amplekso de la laboro mem, kiu postulus centojn da horoj de registrado nur por produkti mez-bonajn sonojn.

Tiaj problemoj kaŭzis novan halton de la disvolvado. Tiu paŭzo daŭris pli ol unu tutan jaron, ĝis venis la ideo uzi sintezajn anstataŭ homajn voĉojn. Tia strategio ŝajnis pli konvena ĉar per parol-sinteziloj eblus pli efike produkti prononcajn modelojn, kun pli konstanta kvalito.

Sed ĉu entute ekzistis parol-sintezilo por Esperanto? Antaŭ kvar jaroj la respondo al tiu demando estis emfaza „ne”. Tamen ni tiam informiĝis, ke oni jam laboras por krei tian ilon surbaze de sinteziloj por lingvoj kun simila fonetika sistemo. Tiu informo ne tuj solvis nian problemon, sed almenaŭ donis horizonton al la tuta projekto.

Kvankam ĝi nun ŝajnas memevidenta, la fina solvo devis atendi unu plian jaron por aperi. Tio okazis, kiam fariĝis pli klare, ke por la kurso sufiĉus havi pretajn son-dosierojn kun bonaj prononcaj ekzemploj, sed ke la sintezo ne bezonus esti samtempa, tio estas, la kreado de la sonoj povus okazi antaŭ la uzado de la kurso mem. Laŭ tiu strategio eblus produkti la prononcajn modelojn pere de jam ekzistanta sintezilo de lingvo kun simila fonetiko (kun ĝustigoj de tiu aŭ alia fonemo), kaj tuj alŝuti sondosierojn al la kursa paĝaro. Do, ni ne plu devis atendi la finpretigon de aparta sintezilo por Esperanto.


Do la sekva paŝo estis trovi parol-sintezilon por lingvo kun simila fonetiko, kiel ekzemple la kroata aŭ la ĉeĥa, adapti la Esperantajn grafemojn al la koncernaj grafemoj de tiuj lingvoj kaj tiam sintezi la parolojn. Tiel ekzemple la frazo „ĉu ankaŭ ĝi estas plumo?” transformiĝis al „ĉu ankau dži estas plumo?”, tiamaniere, ke parol-sintezilo por la ĉeĥa lingvo povas bone prononci ĝin. Do, per tia strategio ni iom post iom sukcesis krei la son-dosierojn por ĉiu teksto aŭ vorto de la kurso.

La unuaj rezultoj de tia strategio ne estis perfektaj, sed almenaŭ kontentigaj el lerniga vidpunkto ĉar, kvankam iomete roboteca, la unua parol-sintezilo uzata produktis voĉojn kun la ĝustaj fonemoj. Do kun tiaj voĉoj la unua versio de la kurso estis diskrete publikigita en la Reto en decembro 2013.

La familioj Selo kaj Rino loĝas nek en la urbego nek en la urbeto, sed en **antaŭ-urbo** de urbego.



Iliaj domoj estas ne en la urbego, sed **ekster** ĝi.



Malgraŭ la ĝenerale pozitivaj reagoj de esperantistoj, kiuj esploris la kurson, aŭdiĝis plendoj rilate al la „troa roboteco” de la voĉoj. Konstateblis do, ke paradokse esperantistoj tute ne akceptas iun ajn gradon da artefariteco...

Tio stimulis nin serĉi eĉ pli taŭgajn parol-sintezilojn kaj per ili refari la tutan stokon de son-dosieroj. Tiu plibonigo konsumis pliajn monatojn, kaj la novaj sondosieroj estis alŝutitaj al la kurso meze de la unua semestro de 2014. La voĉoj tiam jam aspektis efektive pli naturaj, kaj de tiam ne plu aŭdiĝis fortaj plendoj rilate al la kvalito de la sonoj.

Aldonaj avantaĝoj de la nova versio

Alia menciinda diferenco de la komputila versio estas en tio, ke ĝi kapablas havi la ŝlosilon de ĉiu ekzerco apud la responda kampo mem, tiel ke, kaze de dubo, la lernanto povas tuj trovi la helpilon tie. En la presita kurso, pro

manko de la hipertekstaj rimedoj, ĉiuj ŝlosiloj troviĝas en la fino de la libro, en loko malpli konvena por rapida kontrolo.

La komputila medio ankaŭ ebligas aŭtomatan korektadon de la ekzercoj. En la komputila versio de la kurso *Saluton!* tiu rimedo uzas simplan komparon de la tajpitaj respondoj kun la respektivaj ŝlosiloj. Se ili kongruas, la lernanto tuj ricevas konfirmon per sono kaj kontrol-marko. Se io ne estas ĝusta, malsama sono indikos tion, kaj la lernanto havos la okazon repensian respondon aŭ, lastrimede, premi butonon kaj plenigi la kampon per la ŝlosila respondo. Tio aliflanke signifas, ke la nuna versio la kurso ne disponas pri pli kompleta kaj rafinita sistemo por kontrolado kaj diagnozo de la eraroj. Alivorte, la nunaj rimedoj taŭgas por esplora lernado de la lingvo fare de la uzantoj, sed ankoraŭ ne liveras al ni, surbaze de la plej oftaj eraroj, kernajn informojn pri la plej malfacilaj elementoj de la kurso, aŭ la rilato inter tiuj malfacilecoj kaj la lingva fono de ĉiu lernanto. Tial en tiu aspekto ĝi situas preskaŭ samloke kun la presita versio, escepte pro tio, ke en la interreta versio eblus havi iom da kontrolo pri la deveno de la lernantoj, pri la tempo, kiun ili pasigas sur la paĝaro, kaj kiom intense ili interagis kun la elementoj tie.

Tiu malstrikta kontrolado de la respondoj, kiujn la lernantoj produktas, parte ŝuldiĝas al la decido ne postuli formalan enskribiĝon en la kurson. Tiun decidon pravigas la fakto, ke la ĉefa celo de la kurso estas lernigi Esperanton kaj deviga enskribiĝo en la retejon efikus kiel barilo, kiu forpelus multajn el la eblaj uzantoj de la kurso. Rezulte, la pesilo pendis favore al la libera aliro al la kurso, eĉ se tio malebligas pli individuan gvidadon de la lernantoj.

La finaj ŝanĝoj en la adaptado de la metodo al la nova medio konsistis en la elekto de nova litertipo, ĉar tiu, kiu bone taŭgis por la presita libro ne sufiĉe konvenas por komputilaj ekranoj. Post iom da esplorado pri eblaj alternativoj fine elektiĝis litertipo nomata *Candara*, kiu inter la rekomendataj por komputilaj ekranoj prezentas unu el la plej belaj realigoj de la Esperantaj ĉapelitaj literoj.

Unuaj rezultoj kaj donitaĵoj pri la kurso sur la reto

La unuaj tri monatoj post la finaj plibonigoj de la kurso montris iom stabilan nombron da uzantoj. Averaĝe ĉiutage vizitis la kurson 40 lernantoj. Unu el la konstantaj originoj de tiuj vizitantoj estas la paĝoj pri Esperanto

en Vikipedio, kie ni faris mencion pri la nova kurso en diversaj lingvoj. Tiu nombro altiĝis fojfoje rezulte ekzemple de mencio de la kurso en la fejsbuka paĝo de UEA, sed tiuj fejsbukaj diskonigoj kreas rapidan sed nedaŭran interesiĝon pri la kurso. Plej daŭran interesiĝon kreis mencio de la kurso en la retejo *Esperanto-France*. Tio verŝajne klarigas la elstaran plimultiĝon de la vizitantoj el Francio, kiuj nuntempe (dua semestro de 2014) reprezentas ĉirkaŭ duonon de la tuta lernantaro de la kurso.

La nombro de vizitantoj rimarkinde kreskis post aŭgusto 2014, eble kiel rezulto de la oficiala prezentado de la kurso en la Konferenco de ILEI en julio. Supozeble la diskonigo de la kurso antaŭ trideko da agemaj esperantistoj kreis ĉenan reagon, kiam kelkaj el la partoprenantoj bonvoleme diskonigis la kurson en siaj asocioj kaj inter siaj konatoj.

Alia fenomeno tipa de Interreto estas la oftaj vizitoj de robotoj al la retejo. Tiuj vagabondaj softvaraj agentoj havas la taskon konstante rekrei mapon de la Reto, kaj por tio ili nepre devas viziti refoje ĉiun el la 200 paĝoj de la kurso. Tio estas iom ĝena, kiam oni volas kontroli kaj kalkuli la precizan nombron de veraj lernantoj en la kurso. Unu maniero distingi inter homo kaj roboto estas kompari la nombron da “tuŝoj” de la vizitanto sur ĉiu vizitata paĝo. Por robotoj tiu proporcio ofte estas 1/1, nome, unu tuŝo sur ĉiu paĝo, dum por veraj lernantoj la proporcio estas multe pli granda, indikante efektivan esploron de la elementoj sur la koncerna paĝo.

Ricevitaj reagoj kaj finaj rimarkoj

La kurso povas esti vizitata en la adreso: www.kursosaluton.org. Pro sia relative longa disvolviĝa historio la reta versio de kurso *Saluton!* prezentas modernan kernon sub iom malmoderna kovraĵo, nome, la paĝoj mem ne uzas elstare ĝisdatajn ornamajn trukojn, sed la rimedoj uzataj por produkti kaj mastumi la sonojn de la kurso estas tre novaj. Tio respegulas ne nur la fakton, ke la hipertekstaj paĝoj estis kreataj ĉirkaŭ 10 jarojn antaŭ la internaj sonprocezaĵaj rimedoj, sed ankaŭ atestas nian emfazon sur la lernigan celon de la paĝaro, anstataŭ ian klopodon igi ĝin bela, moderna, sed didaktike neefika diletantejo. Ni opinias, ke tia strategio pli taŭgas por ordinaraj lernantoj. Aliflanke estas konsentite, ke tre verŝajne la nuna ekstera aspekto de la kurso ne sufiĉe allogos ĝisostajn modernemajn interretulojn. Sed ni planas, iom post iom, plibonigi eĉ la supraĵon de la kurso, se ĝi efektiviĝos kiel populara kaj utila instruilo por Esperanto. Unu

el tiuj plibonigoj, jam decidita kaj teknike provita, estos la aldono, sur ĉiu paĝo, de pli klara indekso de la enhavoj, tiel ke la uzantoj povu pli bone orientiĝi dum la navigado tra la kurso.

En sia nuna stato la interreta versio de la kurso *Saluton!* povas esti efika por tiuj, kiuj lernas Esperanton aŭtodidakte, sed ankaŭ utili kiel komplemento por enklasa lernado de la lingvo. Lingvo-akirado progresas pli rapide, kiam lernantoj havas pli intensan kaj konstantan kontakton kun la instruata lingvo. Al lernantoj, kiuj havas unu solan ĉeestan klason pri la lingvo semajne, interreta kurso kun amaso da tekstoj kaj sonoj povas doni aldonan okazon plu trempiĝi en la lingvo. Tio povus iĝi eĉ pli konvena, se la instruantoj konscie stimulos kaj gvidos tiajn eksterklasajn aktivajojn. Ĉu la Reta kurso *Saluton!* estos iam uzata paralele kun laŭdindaj iniciatoj kiel Lingvolanĉilo „*Springboard to Languages*”, la tempo diros.

El Belgio, Francio kaj Hungario estis ricevataj tri skribaj reagoj de esperantistoj, kiuj provis kaj aprobis la kurson, ĉiuj kun tre ĝentilaj laŭdoj pri la iniciato kaj sugestoj pri ĝia diskonigo. Tiaj eĥoj estas forta stimulo por pluri laŭ la pado de instruado de Esperanto per oportunaj, senpagaj kaj ĉiehaveblaj rimedoj. Eble oni povus diri, ke nia iniciato rangas inter tiuj bazitaj sur la kredo, ke la „fina venko” de la lingvo iam rezultos ne de vasta konvinkado de registaroj kaj organizaĵoj, sed de la praktika konstato, ke jam sufiĉe multaj unuopuloj, en tre diversaj landoj, vere scipovas la lingvon.

Bazaj universitataj studoj por Esperanto-instruistoj.

Restartis la interlingvistikaj studoj de UAM en Poznano

de Ilona KOUTNY, Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj,
<http://www.amu.edu.pl/~inter/>

La universitata instruado de esperantologio kaj interlingvistiko estas ne nur montrilo por la statuso de Esperanto, sed ankaŭ nemalhavebla por profesiaj instruistoj de esperanto. La trijaraj postdiplomaj interlingvistikaj studoj de la pola Universitato Adam Mickiewicz (UAM) disponigas la lingvistikajn kaj komunikadajn bazojn, enkondukas en la lingvistikon, literaturon, historion kaj kulturon de Esperanto kaj per la lastjara specialiĝo pri instruado formas kompetentajn instruistojn. La sume akireblaj 120 ETCS-

poentoj kunmezureblas kun la postuloj de magistrasaj studoj. Ĉiun trian jaron restartas tiuj unikaj studoj ekde 1998.



La 20-an de septembro 2014 kun 26 aliĝintoj el 14 landoj (7 el Brazilo, po 3 el Hispanio kaj Pollando, po 2 el Slovakio kaj Svedio, po 1 el Rusio, Kroatio, Irano, Ĉeĥio, Hungario, Nederlando, Belgio, Francio kaj Granda Britio) la studoj rekomenciĝis la 6-an fojon. La gestudentojn bonvenigis la vicdekanino de la Novfilologia Fakultato, prof. Aldona Sopata, kaj la gvidanto de la studoj, prof. Ilona KOUTNY.

La brazila entuziasmo videble kreskis malgraŭ la granda distanco kaj portis freŝan koloron al la eŭropa paletro. La varbado estis nun pli grandskala, dank' al la paĝaro edukado.net, UEA kaj ESF. Ĉi-lastata disponigis bazan stipendion al 13 partoprenantoj. *Edukado.net* sukcese lanĉis kampanjon por helpi financi la vojaĝkostojn al Pollando de kelkaj partoprenantoj. ESF lanĉis subtenkampanjon **AMU Poznanon!** por la sekvaj sesioj, ja la regula partopreno postulas grandan sindediĉon de la gestudentoj.

Dum la unua semajna intensa sesio en septembro okazis **kurso pri interlingvistiko** kun Vera BARANDOVSKA-FRANK (Germanio, profesoro de AIS), donanta superrigardon pri planlingvoj, al ĝi kontribuis Ivan COLLING (el Brazilo), kiu ĵus finis siajn interlingvistikajn studojn ĉe AMU. **Esperantan kulturon** enkondukis Zbigniew GALOR (prof. en la

Universitato de Szczecin, Pollando), al tio adoniĝis interesaj prelegoj pri lingvo kaj kulturo de Sabine FIEDLER (prof. en la Universitato de Leipzig, Germanio), pri la E-gazetaro de Jukka PIETILÄINEN (docento en la Universitato de Tampere, Finnlando) kaj pri Esperanta radiofonio de Barbara PIETRZAK (Pola Retradio, estrarano de UEA).

La unuan periodon de la **Esperanta literaturo** prezentis tradicie Tomasz Chmielik (tradukisto kaj eldonisto, Pollando) kaj Lidia Ligeża (poetino el Krakovo, Pollando). **Fonetikon kaj fonologion** – startante de ĝeneralaj bazaj nocioj al karakterizo de Esperantaj sonsistemo kaj prononca normo – entreprenis Ilona KOUTNY (gvidanto de la IS, prof. de AMU, membro de AdE) kaj Nicolau DOLS SALAS (prof. en la Universitato de la Balearaj Insuloj). Post koncizaj prezentoj kaj diskutoj de ĉiuj studobjektoj sekvis hejma laboro.

Dum la septembra sesio okazis ankaŭ la **finaj ekzamenoj de la antaŭa grupo**: 7 persistaj gestudentoj (3 el Brazilo, po unu el Germanio, Hungario, Litovio kaj Svislando) prezentis interesajn rezultojn de sia laboro: Ivan COLLING: *Ĉu la polurita spegulo estas fleksebla kaj amika? Kelkaj konsideroj pri logikeco, reguleco, simpleco en lingvoj*; Guilherme JARDIM: *Analizo de la rilato inter spiritismo kaj esperanto en Brazilo*; Rita M. N. DE MORAES: *Du malsimilaj romanoj, du similaj vojoj*; Anja Christina STECAY: *Funkcio de kieco en esperantaj krimromanoj*; Szabolcs SZILVA: *Klasifikado de planlingvoj*; Snaiguole MALYCH: *Ĉu esperantistoj agas inter si alimaniere ol kun neesperantistoj?*; Mireille GROSJEAN: *Komunikado en Afriko*. Informoj pri la laboraĵoj aperas en Edukado.net. Iuj intencas daŭrigi siajn esplorojn, eĉ doktoriĝi.

La unujaran **instruistan trejnadon** (kunlabore de UAM, ILEI kaj *Edukado.net*), kiu okazas paralele kun la lasta jaro de la universitataj studoj, finis 5 partoprenintoj (Annie GRENTE kaj Marielou COCHARD el Francio, Martin PTASINSKI el Germanio, Luis LADEIRA el Portugalio kaj Karina OLIVEIRA el Brazilo) per finlaboraĵo kaj kompleksa ekzameno, ili akiris ILEI-atestilon pri instruado.

La sesion sekvis la **3-a Interlingvistika Simpozio** (25–26.09.2014), kun la ĉefa temo: **internacia komunikado**. Ĝi estis malfermita al neesperantistaj kontribuantoj, kiuj konsistigis pli ol kvaronon de la prelegantaro. Malfermis ĝin vicrektoro de UAM kaj parolis la vicdirektoro de la Lingvistika Instituto. Prelegoj estis prezentataj en Esperanto, la pola kaj

angla, ili temis pri lingvopolitiko, interkultura komunikado kaj diversaj aspektoj de esperantologio kaj interlingvistiko kaj ankaŭ pri instruado. La programo kaj resumoj troviĝas en la retejo de la Studoj. Elektitaj artikoloj aperos anglalingve en la universitata lingvistika revuo JKI (*Lingvo. Komunikado. Informado*) en 2015.



La **bankedo** kunigis la malnovajn kaj novajn gestudentojn, instruistojn kaj prelegantojn en agrabla etoso. Gastis kaj laŭdis la aranĝon la vicdekano de la Novfilologia Fakultato, prof. Maciej KARPIŃSKI kaj la direktoro de la Lingvistika Instituto, prof. Piotr WIERZCHOŃ. La gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj transdonis la 10-jaran son- kaj videoarkivon de la Studoj al la reprezentantoj de la Viena Esperanto-Muzeo, CDELI (Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia en La Chaux-de-Fonds, Svisio) kaj Edukado.net. La semajnon finis la **30-a Arkones**, fama kaj riĉa kultura aranĝo kun muziko, filmoj, teatraĵoj, ludoj kaj multaj diskutoj. Al ties programo kontribuis ankaŭ prelegintoj kaj studentoj de la Interlingvistikaj Studoj.

Post diligenta **hejma laborado**: plenumo de testoj, legado de proponata literaturo kaj pretigo de semestraj laboraĵoj el ĉiuj 4 studobjektoj la sesa interlingvistika grupo sukcese kaj bonetose daŭrigis siajn studojn per la **dua ĉeesta sesio** (31.01–06.02.2015) kun la partopreno de 20 gestudentoj el 24. Ili alfrontis ankaŭ la parolajn ekzamenojn dimanĉe kaj merkrede. La

internacia partoprenantaro vigle kontribuis al la kurso pri **komunikado** (gvidata far Ilona KOUTNY) komparante la diverskulturajn lingvajn kaj nelingvajn komunikadmanierojn.

Lidia Ligeza enkondukis la ĉeestantojn en la poezion kaj Tomasz CHMIELIK en la prozon de la **dua periodo de la Esperanta literaturo**. Michael FARRIS el la Lingvistika Instituto de UAM transdonis la bazojn de **morfologio kaj sintakso** kun multaj diverslingvaj ekzemploj al la gestudentoj. Kadre de **Esperanta gramatiko** estis traktataj tiklaj problemoj kiel la morfemklasifiko kaj la radikkaraktero, la -ata/ita problemo. Ĉi-foje krom Ilona Koutny kontribuis al la gramatika kurso Cyril BROSCH, juna germana doktoro pri lingvistiko, kiu finis la interlingvistikajn studojn en 2008. La partoprenantoj havis eblon diskuti kun la kursgvidantoj.

Kiel kutime, merkrede okazis la komuna vespero, ĉi-foje kun prezento de lingva seksismo en Esperanto de Cyril BROSCH, de ironiaj poemoj de Lidia LIĞEZA kaj abunda kontribuo de la partoprenantoj: poemoj, muziko kaj kantoj (Eida LIMA, Małgorzata ZIĘBA-SZMAGLIŃSKA, Maria VERZUN), interalie la Esperanta versio de la eŭropa himno (Johano DERKS), memmuzikigitaj Zamenhof-poemoj (Michał KOZICKI), poemtradukoj (Suso MUIÑOS) kaj ankaŭ propraj poemoj de Paŭlo NASCENTES. Victor LUFIMPU montris afrikajn dancojn kaj kantojn el Kongo kaj Zuzanna KORNICKA fermis la bonetosan kunestadon per kantoj kaj gitarludo.

Post la intensa tutsemajna laboro sekvis la tradicia ekskurso al Toruno, kie Maria POKRZYWNICKA, Teresa NEMERE kaj Kinga NEMERE-CZACHOWSKA akceptis la interesiĝeman grupon kaj gvidis ĝin tra la urbo. Okazis vizito en la Kopernik-muzeo kun Esperantlingva prezento de la historio de la urbo, en la kulturdomo kun spektaklo de Studio P, en liceo, kie Grabowski havas memortabulon. La ekspozicion pri la ĉiutaga popola vivo en la Etnografia Muzeo klarigis vigle Maria POKRZYWNICKA. Fine torunaj mielkukoj kun kafo, teo atendis la gestudentojn, Maria P. kantigis kaj ludigis ilin.

Bildoj pri la septembra kaj februara sesioj troviĝas ĉe Edukado.net (Fotoalbumo "Poznan 2014 septembro").

Eblos aliĝi al la **sekva unujara instruista trejnado** en 2016/17, kiu okazos kune kun la instruista specialiĝo de la universitata grupo.

La Interlingvistikaj Studoj: interna vido

de Suso MOINHOS



La unuan tagon ni venis plenaj de entuziasmo al la Novfilologia Fakultato. Kun kelkaj personoj mi interkonatiĝis la antaŭan vesperon, en la studenta gastejo Jowita. Aliajn mi identigis per Facebook, kvankam ni neniam kunestis. En la klasĉambro estiĝis rekonaj, salutoj, demandoj. Entute dudek ses studentoj el dek kvar ŝtatoj de la mondo. Neniam antaŭe estis tiom diversa kaj granda grupo en la Interlingvistikaj Studoj. Nia deven-mapo etendiĝis tiom vaste, ke ĝia orienta limo estis Irano kaj la okcidenta Brazilo. Ĝuste

el ĉi lasta lando alteriĝis, post longa vojaĝado transatlantika, la plej multnombra landa kontribuo: sep aliĝintoj.

Malantaŭ ni restis esperoj, strebadoj kaj, miakaze, antaŭaj klopodoj partopreni la studojn. La programon mi plurfoje legis. Tri jaroj povas ŝajni tro, sed la amplekso de la studobjektoj ja tion postulas. Kiam mi plenigis la aliĝilon kaj sendis ĝin, mi komprenis, ke mi ĵus prenis gravan decidon.

Mi ricevis plurajn helpojn kaj ja estas juste, ke mi menciu ilin. Esperantic Studies Foundation (ESF) pagas al mi kaj aliaj studentoj la kotizon. Fundación Esperanto, el Zaragozo (Hispanujo), helpis min per stipendio. Aliflanke, Katalin Kováts organizis monkollektadon en Edukado.net, al kiu kontribuis pluraj personoj. Per tiu iniciato kelkaj samideanoj ege malavare helpis nin. Mi ankaŭ volas emfazi, ke en ĉiu momento Ilona Koutny, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj, zorgadas pri la studentoj kaj iliaj unuopaj bezonoj kaj lerte kunordigas la bonan funkciadon de la tuto. Mi restas tre danka al ĉiuj pro ilia helpo kaj subteno, sen kiuj mi ne povus partopreni.

Krome, en 2015 ESF lanĉis la kampanjon "AMU Poznanon" (vortludo pri la siglo de Adam-Mickiewicz-Universitato), kun aparta karakterizo: al ĉiu mondonaco por subvencii la studentojn, ESF kontribuos per samvalora kvanto. Ĉiuj menciitaj strebadoj kaj ceteraj helpoj al aliaj partoprenantoj

fare de organizoj kaj unuopuloj pelas nin kaj igas nin senti, ke ni trafe enŝipiĝis por ĉi longa vojaĝo.

Tamen bedaŭrinde kelkaj forlasis la krozadon. Eble ili atendis alion, ne tiom scienca, aŭ miselektis la trejniĝon, aŭ simple iliaj vivoplanoj ŝanĝiĝis. La enhavo de la Interlingvistikaj Studoj estas komparebla kun filologiaj studoj de ajna lingvo: fonologio kaj fonetiko, morfologio, sintakso, literaturo. Kutime unu el la lernobjektoj en filologiaj studoj de latinidaj lingvoj, almenaŭ en Eŭropo, estas latinida lingvistiko, kiu helpas enkadrigi la ceterajn studerojn; en la kazo de la Interlingvistikaj Studoj tiun saman rolon ludas la kurso de interlingvistiko. La Esperantan literaturon oni studas dum kvar semestroj, kaj la legolisto estas sufiĉe vasta.

Kio do ne estas la Interlingvistikaj Studoj? Ili certe ne estas movada renkontiĝo. Oni okazigas abundajn eventojn laŭlonge de la tuta mondo kun riĉaj, buntaj kaj diversaj programoj, sed la Interlingvistikaj Studoj ne temas pri tio. Ili ankaŭ ne estas trejniĝo por lingvoinstruado aŭ pedagogia kurso. Tiucele RITE de Edukado.net aŭ la unujara instruista trejnado de UAM, ILEI kaj Edukado.net estas bonaj alternativoj. Kaj, fine, ili ne konsistigas ian rimedon por altigi la lingvonivelon. Ĝi devas esti kontentiga jam antaŭ la komenco de la studoj; se ne, oni ne kapablos kompreni la lecionojn kaj librojn, sukcese trapasi ekzamenojn kaj verki laboraĵojn. Por plibonigi sian Esperanton, interesitoj sin turnu al ĉeestaj aŭ retaj kursoj kaj, specife por altaj lertecoj, al distancaj lernoprogramoj kiel ekzemple tiuj proponataj de la Jagelona Universitato.

En la dua sesio, en februaro, ni konstatis ion, ĝis nun ne palpeblan: la rapidan sinsekvon da lernendaĵoj. Efektive, dum la semajnoj en Poznano ni ricevas nur enkondukon, iaspecan giston por la hejma bakado de niaj panoj. Tiel ni venas al kruca punkto pri la Interlingvistikaj Studoj: kelkfoje formuliĝas la demando, ĉu la studoj estas sufiĉe altnivelaj, ĉu ili konformas al espereblaj profesieco, seriozeco kaj universitata karaktero. Mi ĉiam respondas "jes!": la profesoroj estas spertuloj pri sia fako, plejparte ili instruas en universitatoj. Kaj aldoniĝas: la nivelon decidu ankaŭ ni studentoj. Ni ĉiam havas la eblon postuli plian enprofundiĝon, kaj la docentoj konscias pri tio, ke ilia laboro estas multspeca en la senco, ke ili devas adaptiĝi al personoj venantaj el diversaj sciencaj branĉoj sed ankaŭ al filologoj kaj lingvistoj. El tiaj esceptaj klasoj kiel la nia povas fonto nur riĉiĝo por ĉiuj membroj.

Alia ebla demando estas la valideco de la studoj. Mi ŝatus, ke la studoj estu magistriĝa kurso; tamen ili konsistigas la plej altnivelan kaj ampleksan specialistiĝon rilate Esperanton en la tuta mondo. Krome, de la Bolonja Deklaracio de 1999, en ĉiuj landoj de la eŭropa kontinento krom Belorusio, plus en Turkio kaj Kazahio, funkcias la tiel nomata Sistema de Transmeteblaj kaj Kunigeblaj Kreditoj (laŭ la angla siglo: ECTS). Tiuj kreditoj estas, se tiel diri, la valoro de la superaj studoj, varianta laŭkaze. Laŭ la Deklaracio dua universitata ciklo, tio estas, magistriĝo, devas havi de 90 ĝis 120 ECTS¹. Nu, la nunan lernojaron la Interlingvistikaj Studoj ricevis ETCS por la unua fojo, kaj ili havas la maksimumon: 120 kreditojn ricevotajn de tiuj, kiuj sukcese venos al la fino. Mi komparis tiun donitaĵon kun la realo en universitatoj proksimaj al mia loĝloko. Kiom da ECTS havas magistriĝaj kursoj en la sfero de filologio kaj lingvistiko en tiuj centroj? En la universitatoj de Vigo, Santiago de Compostela kaj Corunha tiuj magistriĝaj kursoj estas du-semestraj kaj havas nur 60 ECTS; la Universitato de Minho disponas 4-semestrajn kursojn valorantajn 120 ECTS, same kiel niaj Interlingvistikaj Studoj en Poznano.

Konklude, la Interlingvistikaj Studoj ja valoras la penon. Ili ne nur provizas studentojn per solidaj konoj, sed ankaŭ ebligas fakiĝon en la lasta jaro (pri lingvistiko, literaturo, interlingvistiko, didaktiko, komunikado aŭ tradukado) kaj rolas kiel ĉenero por posta doktoriĝo. Persone mi sentas, ke mi estas tre bonŝanca, ĉar fine mi povas realigi delonge kovitan sonĝon: kompletigi miajn filologiajn studojn per fakiĝo pri Esperanto.

ESPERANTO-SUMOO: Lukti kontraŭ si mem. Rekorda nombro de partoprenantoj en marto 2015!

de *Mireille GROSJEAN*

Japanaj luktartoj estas diversaj. Unu estas aparte fama, temas pri Sumoo, kie la luktistoj dikiĝas enorme, tamen ili restas tre moviĝemaj kaj rapidaj. Emerita instruisto japana, s-ro HORI Jasuo, lanĉis legsesiojn laŭ la sama ritmo kiel la sumoo-ĉampionadoj. Li nomis tiun agadon ESPERANTO-SUMOO. En marto 2015 okazis la 33-a sesio. Okaze de ĝi pli ol 200 personoj partoprenis tra la tuta mondo. Tiuj e-istoj devenas el 27 landoj. La

¹ En esceptaj okazoj ĝi povas havi nur 60 kreditojn.

partoprenantoj mem decidas, kion ili legos, kiom da paĝoj ili legos ĉiun tagon. La sesio daŭras 15 tagojn. Sesio revenas ĉiun duan monaton. Tiu agado kuraĝigas homojn legi, legadi, finlegi libron. Konsekvenco de tiu agado estas, ke homoj progresas en la uzo de nia lingvo. La gajnintoj ricevas atestilon. ILEI gratulas s-ron HORI pro tiuj ideo kaj laboro, kiuj bonege kongruas kun la celoj kaj agadoj de ILEI. Sinjoro HORI skuas la e-istojn por progresigi ilin. Kun sama energio li propagandas E-on. Rigardu la foton: ni vojaĝis triope al la okcidenta marbordo de Japanio en 2009 kun HORI Jasuo kaj la fotisto ARAI Toŝinobu. Sur la ŝildo legiĝas, ke japanoj kun sviso promenas kaj parolas kune danke al E-o.



Pri ESPERANTO-SUMOO informiĝu legante en www.esperanto-sumoo.strefa.pl kaj en IPR 2014/4 paĝo 13. Tiu nombro de 207 sumooistoj devas kreski! Helpu!! Partoprenu!!! Disvastigu!!!!

Strategioj por lerni fremdan aŭ negepatran lingvon

de Julián HERNÁNDEZ ANGULO, nacia estrarano pri instruado de Kuba Esperanto-Asocio, instruisto de Havana Pedagogia Universitato



Multaj personoj, kiuj lernas fremdan aŭ negepatran lingvon en diversaj lernejoj ne konas la plej fruktodonajn manierojn kaj agojn, por ke ilia lernado estu sukcesa, precipe kiam ili lernas en lando, kie la lingvo lernata (cellingvo) ne estas la gepatra.

Lerni lingvon kaj fariĝi lingvo-komunika kompetentulo postulas studojn, daŭran praktikon kaj sindediĉon. Ne ĉiuj, kiuj lernas lingvon, atingas tiun gradon de kompetento pro tio, ke ili ne havas ideon, kiel aliri tiun kompleksan proceson kaj neniu montras al ili

sekvendan vojon por sukcesi. Esplori la plej bonajn manierojn, agojn lerni lingvon kaj kundividi spertojn kaj travivaĵojn tiurilate kun novaj kolegoj kaj lernantoj estu daŭra tasko de la plej spertaj Esperanto-instruantoj kaj instruistoj.

Por lerni lingvon, oni devas evoluigi kvar kapablojn; temas pri aŭskultkompreno, parolo, legokompreno kaj skribo. La aŭskultkompreno kaj la legokompreno estas elkodigaj kapabloj kaj la parolo kaj la skribo estas produktivaj kapabloj. Aŭ: aŭskultado kaj legado estas komprenaj aŭ ricevaj aŭ akiraj kapabloj. La aŭskultkompreno kaj la parolo estas parolaj kapabloj kaj la legokompreno kaj la skriboakto estas perliteraj kapabloj. Ni memoru, ke analfabetuloj scipovas la parolan lingvon sed ne la skriban. Por komuniki oni devas iugrade posedi lingvistikajn aspektojn; nome, la fonetikan, gramatikan kaj leksikan sistemojn de la lernata lingvo. Surbaze de tiuj ĉi lingvistikaj aspektoj lernantoj povas konstrui signifojn, kiam ili aŭskultas, legas, parolas kaj skribas. Manko de tiuj aspektoj malfaciligas kaj bremsas komunikadon. Tiu fenomeno povas esti senkonscia. (Pluraj pedagogoj kaj lingvometodikistoj verkis pri tiu ĉi aspekto).

La strategioj, kiujn la aŭtoro rekomendas, rilatas kun la kvar komunikaj kapabloj kaj kun la lingvistikaj aspektoj, kiuj subtenas ilin.

Por la evoluigo de la aŭskulta kompreno mi rekomendas la jenajn agojn (ekzercojn):

- aŭskulto kaj reaŭskulto de surbendigitaj materialoj (dialogoj, monologoj, rakontoj, kantoj ktp.) multfoje por trejniĝi en la kompreno de la ĉefaj, komplementaj ideoj kaj detaloj. La reaŭskultado de materialoj ebligas identigi vortojn, frazojn, parolturnojn, ideojn, kiujn ni ne aŭdis antaŭe. (Gravas ankaŭ aŭskulti plurajn parolantojn de la lingvo lernata por alkutimiĝi al diversaj akĉentoj kaj prononcm manieroj.)
- aŭskultado de parolaj tekstoj por identigi sonojn, intonaciajn modelojn, ritmon, akcenton, gramatikajn modelojn, vortojn rilatantajn kaj komunikajn funkciojn ktp.,
- filmspektado kaj uzo de aliaj aŭdvidaj materialoj kun aŭ sen subtitoloj.

Ne eblas lerni fremdan aŭ negepatran lingvon sen aŭskulti ĝin. Tial lernantoj devas profiti diversajn momentojn de la tago por aŭskulti la lernatan lingvon. Kuirante, lavante aŭ gladante vestaĵojn, starante en bushaltejo, piedirante ktp. oni devas aŭskulti la novan lingvon.

Por plibonigi la lingvan prononcon, la aŭtoro rekomendas la jenajn agojn:

- aŭskultado kaj reaŭskultado de surbendigitaj materialoj por asimili kaj multe pli konatiĝi kun la diversaj sonoj, intonacioj kaj ritmoj,
 - ripetado de frazoj post modela eldiro por fiksi prononcon, intonacion kaj ritmon,
 - praktiko de laŭtlegado de frazoj kaj alineoj kaj surbendigo de la laŭtlegado por poste sinaŭskulti aŭ por ke alia persono aŭskultu la lernanton por kontroli, kiel li/ŝi prononcas kaj intonacias, kiel la lingvo sonas. Tiel iom post iom oni atingas la ĝustan prononcon de la diversaj sonoj, la intonacion, la akcenton, la ritmon kaj la kunligon de vortoj.
 - daŭra fonetika transskribado de vortoj, por pli konsciigi pri ilia prononco, kiam temas pri lingvoj kiel la angla, kies sonoj havas diversajn skribmanierojn, grafemojn.
 - fari ekzercojn kaj ludojn, kie oni devas identigi sonojn, reprodukti ilin aŭ esprimi vortojn per ili.
- Oni devas priatenti la fakton, ke aŭskultado kaj reaŭskultado de surbendigitaj materialoj ebligas asimili kaj multe pli konatiĝi kun la diversaj sonoj, ritmoj kaj intonacioj.

Por pliriĉigi la vortrezoron de la nova lingvo, ni rekomendas la jenajn agojn:

- legado kaj relegado de pluraj tekstotipoj por familiariĝi kaj pliriĉigi la vortprovizon pri diversaj temoj. Oni ankaŭ povas legi pri ŝatataj temoj, tiel ke la legado ankaŭ estu ĝojplena.
- legado kaj relegado de lernolibroj kaj ekzercaroj. (La fakto, ke oni finas la studadon de lernolibro dum kurso, ne signifas, ke oni devas entirkestigi ĝin por ne plu malfermi ĝin. Oni devas konsideri la fakton, ke ju pli oni progresas, des pli oni povas kompreni la lingvistikan strukturon kaj komunikan enhavon de relegata teksto.
- legado por pliriĉigi la vortrezoron, kiam vi skribas ĉiujn novajn vortojn kaj poste serĉas ilin en dulingva aŭ unulingva vortaro laŭ via lingvo-progreso. Vi nepre devas skribi frazojn per tiuj vortoj, por multe pli fiksi ilin kaj poste de tempo al tempo vi revidu ilin por eviti forgesemon.
- fari personan vortaron, kie vi notas ĉiujn novajn vortojn, parolturnojn kaj konversaciajn esprimojn, kiujn vi legas aŭ aŭskultas dum via konstanta alproksimiĝo al la lingvo.

- skribu tuj surpapere vortojn, parolturnojn aŭ aliajn lingvaĵojn, kiujn vi aŭskultas aŭ legas en la lernejo, sur la strato aŭ en iu alia loko, por poste serĉi ilin en vortaro kaj noti ilin en speciala vortarkajero,
- skribi la novajn vortojn de la semajno sur iu papero, kiun vi metos en tiu loko de via hejmo aŭ laborejo, kie vi plej multe restas, tiel ke vi havu la ŝancon ofte vidi ilin, kio helpos vin aldoni ilin al via vorttrezoro,
- konatiĝi kun la vortelementoj kaj la kunmetaĵoj de la nova lingvo (prefiksoj, sufiksoj, kunmetitaj vortoj ktp.), kio ebligas rekonon kaj aplikon de derivitaj kaj kunmetitaj vortoj de la nova lingvo en diversaj kuntekstoj surbaze de la identigo kaj posedo de radikoj kaj leksikaj kaj gramatikaj morfemoj,
- daŭre esprimi kaj skribi informojn aŭ faktojn per vortoj, frazoj aŭ esprimoj tuj post tiuj aŭskultado kaj legado.
- fari ludojn, pere de kiuj oni povas menci i vortojn de la sama familio, elimini vortojn, kiuj ne rilatas al la grupo, fari frazojn per vortoj, ripeti vortojn antaŭe esprimitajn kaj aldoni plian, diveni vortojn, esprimi vortojn rilatantajn al temo aŭ situacio ktp.

Por scipovi la diversajn gramatikaĵojn, ni rekomendas fari la jenon:

- fari plurajn kaj variajn gramatikekzercojn, kiuj estas en libroj kaj ekzercaroj post la studo de la koncernaj gramatikreguloj, kiuj ebligas la esprimon de la diversaj komunikaj funkcioj. La plenumo de tiuj ekzercoj ebligas la evoluon de gramatikaj, leksikaj kaj fonetikaj aŭtomatoj, kio ebligas al vi esprimi vin ekzakte kaj flue.
- fari ludojn, kie vi devas uzi la gramatikajn regulojn lernitajn, ekzemple, esprimi pasintan tempon, esprimi pasintajn kutimojn, esprimi futuron ktp. Ni emfazas, ke paroli estas produktiva kapablo, kiu postulas daŭran ekzercadon, por scipovi tuj reagi flue, kohere kaj ekzakte al nia alparolinto.

Por evoluigi la parolkapablon, ni rekomendas la jenajn agojn:

- parkerigi dialogojn kaj monologojn,
- scenigi kaj transformi dialogojn kaj monologojn,
- alivorte esprimi saman ideon,
- fari substituan, etendan kaj transforman parolajn ekzercojn unuavide (ĉi-lasta ekzerco igas la lernantojn tuj fari la bezonatajn ŝanĝojn en frazoj, kio trejnas ilin por la tuja reago, kiun postulas la parolkapablo),
- ofte rakonti, transformi, monologi kaj surbendigi tiujn ekzercojn por poste registri vin,

- pensi kaj esprimi parole situaciojn de la ĉiutaga vivo, kiujn oni vidas dum oni atendas aŭtobuson, vicas ie, vojaĝas, paŝas surstrate aŭ estas en iu ajn loko (tiu ĉi estas bona okazo por trejni sin uzi la lingvan vortrezoron kaj organizi ideojn surbaze de gramatikaj modeloj kaj sintakso de la nova lingvo tiom bezonate por la parolo kaj ankaŭ por la skribo),
- legi tekstojn, ĉefe romanojn, kie aperas dialogoj inter diversaj personoj, per kiuj oni povas lerni parolesprimojn, parolturnojn de la ĉiutaga konversacio,
- rolludi dialogojn surbaze de informo liverita,
- rolludi libere pri iu komunika situacio,
- fari ludojn, kie oni devas aldoni informon al iu rakonto, kie oni devos improvizi situacion, kie oni devas paroli pri temo en difinita tempolimo ktp.,
- trejni sin tradukante buŝe tion, kion oni aŭskultas per radio, televido aŭ traduki tion, kion iu persono aŭ personoj esprimas.

Por la evoluigo de la skribkapablo, ni rekomendas la jenajn agojn:

- skribi frazojn, dialogojn, tekstojn, eseojn ktp. ĉiutage pri diversaj temoj, por ke vi trejniĝu en skribado kaj verkado de ideoj, kio ankaŭ postulas daŭran ekzercadon de la gramatiko, vortprovizo, stilo ktp.

Ni rememoru, ke por skribi, oni devas plani kaj organizi la ideojn, pri kiuj oni skribos; tiu ĉi ideo-organizo estas bonega ekzerco por logika pensado. Oni devas determini, kiuj ideoj estos ĉefaj kaj kiuj suplementaj, kiuj ideoj povas esti detaloj kaj kiuj ne bezonatas. Oni devas rilatigi la diversajn ideojn kiel eble plej logike kaj kohera.

Ne forgesu, ke ju pli vi evoluigas la skribkapablon, des pli vi evoluigos la parolkapablon.

- ekzerci vin interpunkcii diversajn tekstojn,
 - ofte traduki frazojn kaj paragrafojn en Esperanton aŭ en la novan cellingvon konsiderante, ke oni tradukas ideojn kaj ne vortojn post vortoj,
 - fari ekzercojn, kiuj postulas respondi demandojn paragrafe uzante kunligajn vortojn, kio helpas evoluigi la tekstokompetenton,
 - konatiĝi kun la paŝoj por skribi aŭ verki alineon konsiderante la evoluigon de la ĉefa ideo kun komplementaj ideoj, kiuj subtenas ĝin kaj detaloj, kiuj kompletigas ĝin.
- (Paŝoj: cerbo-tempesto, ideoplano, malneto-skribo, ĝustigo de eraroj, provlegado, publikigo.)

Por evoluigo de la legokompreno, ni rekomendas la jenajn agojn:

– ofte legi diversajn tekstojn en la fremda aŭ negepatra lingvo celante pliriĉigi kiel eble plej multe vian vortrezoron, viajn legajn kapablojn, kaj kulturen horizonton,

– scii, ke ekzistas diverstipaj legmanieroj laŭ la intenco de la leganto kaj la trajtoj de la teksto. La plej oftaj intencoj estas: a) por kompreni ĝeneralan ideon de la teksto (informa), b) por trovi specifan informon aŭ aspekton, c) por atingi kompletan komprenon kaj reteni kiel eble plej multe la legaĵon (lerna aŭ studa), d) por amuziĝi aŭ distri nin pro tio, ke ni legas temojn, kiuj plaĉas al ni (amuza, distra),

– antaŭvidi ideojn, kiuj povas aperi en teksto, legante ties titolon aŭ rigardante bildon aperanta komence de la teksto,

– legi rapide tiujn tekstojn, kiujn ni legas celante kompreni ĝeneralan kaj ĉefajn ideojn,

– legi rapide tiujn tekstojn, kiujn ni legas celante trovi specifa(j)n informo(j)n,

– legi malrapide tiujn tekstojn, kiujn ni legas celante studi kaj lerni, profundigi temojn pri studobjektoj de kursoj, kiujn ni ĉeestas. Tiu ĉi legotipo postulas analizi, sintezi, kompari, ĝeneraligi, konkludi, kritiki ktp. surbaze de la rilatoj, kiujn ni starigas inter la diversaj elementoj en ĝi aperantaj,

– legi kaj relegi fremdlingvajjn tekstojn substrekante kaj skribante novajn vortojn, kiujn vi devas poste serĉi en vortaro kaj per kiuj vi devas fari frazojn,

– legi kaj relegi fremdlingvajjn tekstojn klopodante malkovri la signifo(j)n de nekonataj vortoj laŭ la kunteksto,

– legi kaj ĝisfunde kompreni tion, kion vi legas konkludante pri ideoj, opinioj, vidpunktoj surbaze de ideoj-interrilato.

La ĉefa celo de legado estas kompreni tion, kion oni legas, konstrui signifojn surbaze de nia intelekta, kultura fono.

Ni esperas, ke la rekomendataj ideoj helpos vin plibonigi la lernadon tiel, ke via komunika kompetento estos iom post iom pli bona. Ni emfazas, ke la lernado estas eterna, ĉar oni neniam devas ĉesi studi. Tiuj ĉi strategioj multe povos helpi vin en via daŭra trejnado.

Bibliografio

Antich de León, Rosa kaj aliaj: Metodologia de la Enseñanza de Lenguas Extranjeras, Pueblo y Educación, Cuba, 1986

Barcsay, Zs., Metodiko en la Praktiko, Hungara E-Asocio, Budapest, 1982
Brown, Douglas: Principles of Language Learning and Teaching, Fourth Edition, 2000.
Ellis G., and B. Sinclair: Learning to Learn English. Cambridge University Press, 1989
Gardner, Robert C. and Mac Intyre, Petr D.: A Student's Contribution to second Language Learning. Part I: Cognitive Variables, 1992
Kovats, Katalin kaj aliaj: Manlibro pri Instruado de E-o, ILEI, Hago, Nederlando, 2005
Nunan, David: Second Language Teaching and Learning. Newbury House Teacher Development, Heinle&Heinle Publishers
Rakuša, Rudolf: Metodiko de la Esperanto-Instruado, UEA, 1991

Paroliga kurso en Hamameto

foto kaj teksto de *Stefan MACGILL*



Venis al bonetosa fino la 8a Mezorianta Kunveno (MK) en Hamameto, Tunizio, kiu altiris 45 partoprenantojn el dudeko da landoj. La finon en la 1-a de aprilo oni markis per kuna festa manĝo kun disdono de diplomoj pri kursplenumo. Okazis deko da prelegoj kaj partopreno en urba festo. La studentoj Sahirĝan kaj Bora prezentis, kune kun la instruisto Murat Ozdizdar (sur foto) la historion de la lernejo UAA en Istanbul, kiu inkluzivas plurjaran programon de Esperanto-instruado. En la kunveno, ankaŭ kurso por lernantoj gravis. Ĉiutage tra multaj horoj ekzercis la

lingvon plejparte junaj studentoj el Tunizio, Alĝerio, Maroko kaj Turkio, sub la gvido de Rafael MATEOS (*la dua de maldekstre, sur la foto*).

Li uzis konvenajn pedagogiajn taktikojn, por ke ĉiu regule parolu (eĉ tiuj, kiuj apenaŭ parolis la lingvon antaŭe), kaj por ke la etoso restu pozitiva kaj atentokapta. Sekve la plurhora kontinua kursumado estas tamen ĝuebla. Tiel kreskas grupeto da parolantoj en tiu mondparto. Venis invito por la 9a MK, kiun neniu kontraŭis. Laŭ tio, la posta Mezorianta Kunveno okazos en Turkio, en spektakle pitoreska regiono en la orienta parto de la lando. La 8a Kunveno finiĝis per du tagoj da ekskursoj, unu al la sankta urbo Kairouan, la alia al Kartago kaj Tuniso kune kun omaĝa vizito al la muzeo Bardo.

Por pli da informoj, vidu en Estrara Komunikado (EKO) 2015/10 kaj /11. Tiu aranĝo okazis sub la ombrelo de la regiona agado de UEA, kiu do okupiĝas pri tutmondigo de la komunumo kaj pri instruado inter junuloj – do, pri la movada evoluigo.

Tempo-mastrumado pere de AMO

de *Stefan MACGILL* (konsulte kun *Veronika POÓR*, kiu kungvidis kun *Eliza POPPER*)

La 2an de aprilo ekis la deka seminario de Aktivula Maturigo (AMO) unu jaron kaj unu semajnon post la fermo de la unua. La nuna aranĝo okazas ene de la Internacia Junulara Festivalo (IJF), aranĝo de la Itala Esperanto-Junularo. La gvidantoj estas Eliza POPPER kaj Veronika POÓR, ambaŭ hungarinoj, kiuj tamen nemulte vivas hejmlande. Liza eklernis Esperanton en februaro, prepare al la gvida rolo – ŝi estas profesia trejnisto en eŭropaj junularaj aranĝoj. Liza neniam havis eblon fakte paroli Esperanton, sed sukcese gvidis la duontagan trejnadon tute en nia lingvo. Venis 21 seminarianoj el dek landoj – Britio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Nederlando, Pollando, Slovakio kaj (devene) Vjetnamio.

La temo de la unua tago estis ‘tempo-mastrumado’; malmulto estu decente regata, ĝi emfazis grupan aŭ individuan plenumon, kun multe da re-raportado. Dum sinprezentoj pluraj diris, ke ili tro ofte malŝparas tempon, ekzemple ĉe ne-utila komputila uzado. Estas tro ofte forŝovitaj sportumado, dormado, ripozo k.s. Facilas mistaksi la bezonatan tempon por taskoj, kaj cedi al interrompoj. Taskoj povas esti ordigitaj laŭ tri kombineblaj kriterioj: graveco, urĝeco kaj rapideco de plenumo. La programo disvolviĝis per

varia mikso de grupa laboro, pli detale prezentita en la Estrara Komunikado de UEA (EKO 2015/11).

Kion pri la valoro de la sesio? Krom tio, ke naskiĝis nova parolanto de Esperanto, ni traktis temon gravan en la reala mondo, kiu rekte rilatas al la ĉiutaga vivo de ĉiu seminariano, kaj tamen kiu portas utilon al la ĉiutema kaj Esperanta agado de la seminarianoj.

ILEI kaj UNESKO

AMO kaj SEVO, printempas....

Mireille GROSJEAN, kun-fondinto de Scio Sen Bariloj

La lerncelo povas esti lingvokapablo aŭ instrukapablo. Ĝi ankaŭ povas esti agadkapablo. Tio okazas kadre de „Aktivula Maturigo” AMO-seminario, laŭ ideo de UEA. Kadre de AMO-seminario en Lomeo, Togolando, mi prelegis pri la strukturo de Unuiĝintaj Nacioj, pri tiu de Unesko kaj tiu de nia movado. Por adekvate alparoli ĵurnaliston, ministron, eble ŝtatestron, oni devas prepari sin diversmaniere, bone koni sian temon kolektante faktojn, adaptiĝi al la celpubliko, klare komuniki. Oni ne parolas same pri Esperanto al kulturministro kiel al turismoministro. Aliaj instruistoj traktis aliajn temojn. Tiu decembrofina kunveno estis tre fruktodona kaj kongruas kun la celoj de Unesko: celregiono Afriko, civitana edukado.

SEminario por **VI**riroj en Kotonuo, Benino, ricevis la nomon **SEVI**. Temas pri la dua **SE**minario por **VI**riroj kun tri temoj: Kapabligo de virinoj en gvidaj roloj, «Unua Kontakto» kun Esperanto kaj legado kaj skribado de la fonua lingvo, la ĉefa benina lingvo [vd la *foton de 4 partoprenintoj sur K4*]. Ĝi akiris la nomon **SEVI** kaj ni esploru la alegorion de la **ARBO**: radikoj estas la fonua lingvo, ĉiutaga kaj denaska lingvo de la partoprenantinoj, branĉoj estas kontakto kun la tuta mondo danke al Esperanto. Sevo estas ia sango ĉe la arbo, do nutrado. La partoprenantinoj substrekis la taŭgecon de la triparta enhavo.

Pri tiu seminario: temis pri plena semajno en formo de studcela kunloĝado. Partoprenantinoj estis 15 virinoj en la aĝo de 21 ĝis 29 jaroj, ĉiuj en supera studado aŭ finintaj ĝin. Ĉiuj parolas kutime, normale kaj denaske la fonuan

lingvon, la plej oftan nacian lingvon. La oficiala lingvo estas la franca, per kiu tiuj junulinoj studas universitatnivele. Post tiu kurso ili kapablis legi librojn en la fonua lingvo, verki telefonajn mesaĝojn kaj skribi iun aĉetliston, same kiel ili parole farus tion. Ili vivas en diglosia socio, temas pri situacio, kiun ni ne facile povas imagi: konstanta uzo de du lingvoj, per Esperanta vorto: du-idiom-ism-o. La unua tia semajno okazis en januaro 2015. La dua en februaro 2015 kun subteno de ILEI. Ambaŭ staĝoj estis organizitaj de «Scio Sen Bariloj» SSB. Ĝia prezidanto Privas TCHIKPE gvidis la kurson pri kapabligo de virinoj en gvidaj roloj. Tuŝante 11 virinojn en januaro kaj 15 virinojn en februaro, SSB prezentis Esperanton al talentaj personoj. Du tagojn post la fino de la kurso Mathilde ADJAHE sendis al mi afrikan legendon en Eo, kiu aperos en *Juna Amiko*. Nekredeble rapida lernado! Kontaktoj ekzistas kun la junuloj de BOJE, la TEJO-sekcio en Benino. Tiuj staĝoj estis okazo kreskigi reton, kio gravas, kiam iu talenta juna persono havas ambicion. Tia programo adaptiĝas al la Jarmilaj Celoj de Unesko: edukado por ĉiuj, atento al virina kapabligo, respekto de kultura diverseco, celregiono Afriko.



Sur la foto maldekstre apud Mirejo videblas Yao Raymond AFANTCHAO, kiu estis prezidanto de Unio Togolanda pri Esperanto. Pro tio li membris en la reto de Asociigitaj Lernejoj de Unesko en Togolando kaj nun prezidas tiun Asocion. Li instruas pri homaj rajtoj en la Universitato de Lomeo. Li brile instruis pri fondo kaj prizorgado de asocio kaj loka klubo kadre de AMO seminario.

Lernolibro kaj legolibro, ĝuinda verko

*DOI Ĉieko «Hanako lernas Esperanton. Lernolibro»
Eldonejo MEVO-libroj, Jokohamo,
Japanio, dua eldono 2007*

(recenzo de Mireille GROSJEAN)

Tiu libro kuŝis sur breto ĉe mi de monatoj, jaroj. Supozeble la aŭtorino donacis ĝin al mi iam, mi ne memoras ekzakte. Pardonu min! Multaj nelegitaj libroj kuŝas sur miaj librobretoj... Danke al Esperanto-Sumoo mi nun vizitas miajn bretojn, elektas ion.... kaj eklegas ion... kaj malkovras trezorojn....!



Per 26 lecionoj kaj 140 paĝoj la aŭtorino gvidas la lernanton el la alfabeto al ekkono de japana familio kaj japanetosa vivo. Sekvas vortolisto.

La alfabeto aperas laŭ japana maniero, kiun iu leganto povas facile kompreni:


Pa	pe	pi	po	pu	ap
Ba	be	bi	bo	bu	ab
Fa	fe	fi	fo	fu	af
Va	ve	vi	vo	vu	av

Fakte en la du japanaj fonetikaj alfabetoj la konsonantoj ne povas aperi solaj, ili aperas en silabo apud vokalo. Do ni japaniĝu iomete.

En tiu komenca stadio la lernanto devas labori kun gvidanto, instruisto, por aŭdi kaj sukcese prononci kaj la ĉapelitajn literojn. Poste mi povas imagi, ke iu talenta persono povas progresi en Esperanto per simpla legado de la libro, pro la fakto, ke la frazoj unuaj estas ege simplaj «Makoto estas

knabo», «Li estas knabo». Iom post iom venas pli ellaboritaj frazoj per etaj ŝtupoj. Ofte per preskaŭ samaj frazoj la aŭtorino ebligas komprenon de diversaj gramatikaj paŝoj. Same kiel en fabeloj revenas similaj strukturoj, kiujn la leganto rekonas. Okazas plifirmigo. Tra la tuta libro la tekstoj prezentas pli komplikajn strukturojn kaj aperas pli abundaj informoj pri la japana familia vivstilo. Konsekvence la leganto lernas plezure kaj transiras facile el senkonscia al konscia malkovro de nia lingvo.

La novaj vortoj aperas marĝene. Se temas pri objektoj venas desegnaĵoj. Pri la rakonto mem aperas bildoj. Kiam aperas la vorto «junularo» en la paragrafo, aperas «jun-ul-ar-o» en la marĝeno. Tio estas granda helpo por la lernanto.



Informoj pri Esperanta historio kaj movado ne mankas. Subtitolo por tiu verko povus esti «Paŝoj al plena posedo», ĉar paĝon post paĝo la leganto malkovras kaj komprenas pli komplikajn strukturojn kaj finfine vidas ĉiujn regulojn de E-o. La leganto intimiĝas kun la japana vivstilo kaj ekscias multon pri la lando de la leviĝanta suno. Mi aparte ĝuis la priskribon de la jokohamaj haveno kaj parkoj, ĉar mi tie promenis kun la aŭtorino kaj ŝia edzo.

El paĝo 114, jen frandaĵo: «Jam venis aprilo. Multaj floroj floras. Birdoj kantas. Ja estas tre bela sezono. Ĉiuj povas fariĝi poetoj en printempo kaj

aŭtuno. En printempo oni havas deziron verki poemon, kiam oni vidas, ke floroj de sakuro falas kiel neĝo kaj kovras la teron. Oni kantas pri la plezuro de la vivo. Tamen en aŭtuno, kiam oni vidas, ke ruĝaj, flavaj kaj brunaj folioj falas de la branĉoj kaj kovras la teron, oni verkas malĝojan poemon. En printempo kaj aŭtuno oni havas deziron ankaŭ pentri, foti aŭ kanti. Do ĉiuj fariĝas artistoj.» Imagu japaninon en kimono kun ventumilo kaj sunombrelo.... Venas leĝeraj tonoj de bambua fluto al viaj oreloj.... Vi komplete japaniĝis!

El la landoj kaj sekcioj

Ĉinio

Ĉu vi volas korespondi kun ĉinino?

De junio 2013 mi instruas Esperanton en memvolaj kursoj (elementa kaj meza), kiuj neoficiale okazas en la Pekina Lingva kaj Kultura Universitato dank' al la afableco de esperantista profesoro. Ĝus *El Popola Ĉinio* aperigis filmeton pri miaj kursoj. Ĝi estas spektebla ĉe:

http://esperanto.china.org.cn/2015-03/24/content_35141638.htm

aŭ *http://www.espero.com.cn/2015-03/24/content_35141545.htm*.

La kursoj certgrade helpas al la revigligo kaj rejunigo de la movado en la ĉina ĉefurbo, kiel vi vidas en la filmeto.

Se vi konas komencant(in)on, kiu volas per retroŝto korespondi kun unu el tiuj ĉinaj komencantinoj [ĉar ĉiuj en la elementa kurso estas virinoj...], bonvolu skribi al la ĉi-suba adreso.

USUI Hiroyuki, <kontaktingvo@hotmail.co.jp>

Finnlando

Somera kurso en Turku 4.-7.6.2015. Venu studi en Finnlando!

Dum multaj jaroj ni en Finnlando kutimas havi someran Esperantokurson por alvoki novajn personojn en niajn rondojn. Ofte la somera kurso estas ankaŭ somera renkontiĝo de esperantistoj, kiuj venas ne nur el Finnlando sed ankaŭ el aliaj landoj.

La ĉi-somera Esperantokurso okazos en Turku, kiu estas la plej malnova urbo kaj antaŭa ĉefurbo de Finnlando. La kurso estas aranĝita de EAF, Esperanto-Asocio de Finnlando, kunlabore kun Esperanto-societo en Turku kaj ELFI, Finnlanda sekcio de ILEI. La kunlabora institucio en Turku estas Civitana Institucio de Aurala, finne *Auralan kansalaisopisto*, kiu donas la kursejon je nia dispozo kaj reklamas pri la kurso.

La instruisto estos Patrik Austin, sperta instruisto de la internacia lingvo, kiu instruis i.a. en kursoj en la universitato de Helsinki kaj dum someraj kursoj de EAF en Valamo. La kurso estas celita al komencantoj, progresantoj kaj al ĉiuj, kiuj volas havi someran renkonton en Turku kaj samtempe lerni pli.

Ĉiutage estos instruado 5-6 horojn. Tiuj, kiuj ankoraŭ ne konas la lingvon, komencas de la unuaj aferoj. Aliaj profundigos sian lingvoscion pere de la

daŭriga kurso, kiam spertuloj povas helpi la novulojn. Dum libera tempo ni konatiĝos kun la vidindaĵoj de la urbo kun esperantlingvaj ĉiĉeronoj.

Pliajn informojn pri la kurso kaj aliaj praktikaj donas la sekretario de EAF, kiu loĝas en Turku. Ŝi helpas pri aliĝo al la instituto kaj aliaj aferoj, se vi ne scipovas la finnan lingvon. Kontaktadreso: *Tiina Oittinen*, tel. +358-50-5494709, *eafsekretario@esperanto.fi*. *Puutarhakatu 26 A 11, FI-20100 TURKU*. Pliaj informoj ankaŭ sur retpaĝoj *www.esperanto.fi*.

Bonvenon!

Tiina OITTINEN.

Kroatio

La amo brilu ĉie!

Sub tiu titolo la Muzika Unuiĝo Arija en Zagrebo organizis koncerton okaze de la Tago de Sankta Valentino, en la salono de la Kinejo de Studenta Centro, la 14-an de februaro 2015.

La koncertan programon partoprenis junularaj grupoj, korusoj kaj dancgrupoj el elementaj lernejoj de Zagreb kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. En la programo ili prezentis infankantojn kaj dancojn. Inter la dek du grupoj, kiel specifajo, estis ankaŭ la Esperanta koruso "Gajuletoj" el la elementa lernejo *Davorin Trstenjak*, gvidata de sia instruistino Silvija FOSTAČ, kiu prezentiĝis per la kanto "Kiam estas mi kontenta".

La programgvidanto prezentis "Gajuletojn" kiel unikan grupon, kiu kantas Esperantlingve, kaj anoncis ilian vojaĝon al la internacia festivalo de Esperantaj kantoj en Vroclavo (Pollando).

La koncerta salono estis plenplena, kaj post la prezentado de "Gajuletoj" ĉiuj aplaŭdis. La bileto por la koncerto kostis 30,00 kunaajn, sed la koncerto mem havis monkolektan karakteron, kaj la tuta gajno estis donacita al la infana domo Sankta Jozefo en Hrvatski Leskovac.

Marija JERKOVIĆ, mjerkovic@net.hr

Tunizio

Kuraĝigu la nordafrikajn komencantojn!

Dum mia vojaĝo en Tunizio mi gvidas kvintagan kurson por prepari grupon de lokaj junuloj al la Monda Socia Forumo (24/03 ĝis 28/03) en Tunizo, kie ni prezentos Esperanton kaj iomete instruos, kaj al la 8-a Mezorianta kaj Nordafrika kunveno, kiun UEA (Renato Corsetti) organizas en Hamameto de la 28-a de marto ĝis la 2a de aprilo.

En la nuna kurso estas pli-malpli 10 personoj. La materialon, kiun ni uzas, preparis mi mem, ĉar la celo estis kaj estas, ke ili komencu komuniki en

Esperanto kaj povu bonvenigi la gastojn en la kunveno. Mi instruis pri tio, kiel paroli pri tempo, kiel prezenti sin, kiel uzi nombrojn, kiel paroli pri manĝoj kaj manĝaĵoj kaj pri similaj bazaj kaj praktikaj temoj.

Eble vi ŝatus sendi mesaĝon al miaj novaj gestudentoj?

Estus bone, se ili vidus, ke vi apogas ilin!

La mesaĝojn bv. lasi en Facebook ĉe la ligo al la Tuniza Esperanto-grupo aŭ sendi al mia adreso (anniegrente@hotmail.fr), por ke mi povu pludoni ilin al la grupo. Antaŭdankas vin:

Annie GRENTE (fonto: edukado.net)

Ukrainio

E-centro en Ukrainio. Ĉu vi skribos gratulan poŝtkarton?



Komence de aprilo 2015 en mia orienteŭropa nacia universitato nome Lesja Ukrainka ni malfermis Esperanto-centron. La evento okazis enkadre de la festa semajno de Instituto pri eksterlanda filologio. En la instituto jam funkcias la germana centro, la franca centro, la kanada centro, la sveda centro kaj la araba centro, kiuj okupiĝas pri siaj lingvoj kaj kulturoj. La E-centro estos la unua en la ukrainaj universitatoj, kies ĉefa temo estas E-o.

Ĝi funkcios ĉe la unika katedro pri latinidaj lingvoj kaj interlingvistiko, kiun mi dume estras. Ĉi tie mi gvidos specialajn kursojn por studentoj pri E-o kaj interlingvistiko, organizos publikan E-kurson kun eblo doni la universitatan atestilon pri lingvoscio laŭ la eŭropa referenc kadro.

Mi estos tre dankema, se vi povos sendi paperan gratul tekston al la adreso de la universitato: prospekt Voli, 13, urbo Luĉjk, Ukrainio 43026, Orienteŭropa Nacia Universitato „Lesja Ukrainka”, katedro pri latinidaj lingvoj kaj interlingvistiko, al prof. Nina Danylyuk kaj paralele elektronikan version al mia retadreso.

Nina DANILJUK, <nina_daniljuk@ukr.net>

Ĉu korekti? – Kiel korekti? – Kiam korekti?

Mireille GROSJEAN, fremdlingvoinstruisto

Jen grava problemo por instruistoj. Eĉ en restoracio, se ili vidas eraron sur menukarto, ili emas korekti. Temas pri profesia trajto. Ĉu fari, ĉu silenti? En restoracio mi jam venigis la estron kaj montris la eraron, erarojn, tute afable; mi ricevis senpagan kafon. Provu! La okuloj de instruisto tiom kutimas al esplorado de eraroj, ke li (aŭ ŝi, ekde nun mi skribos li por ambaŭ) daŭre vidas la mankantajn literojn aŭ la troajn.

Unua rimarko: se abundas eraroj, mi ne ŝatas korekti, la laboro estas tro giganta. Se estas bona parolado aŭ bona teksto kun etaj mankoj, tiam mi ŝatas ĝustigi tiujn etajn mankojn, por ke la parolanto atingu pli altan nivelon aŭ eĉ perfektan esprimon. El tio diversaj personoj jam rimarkis, ke, se mi proponas korektadon, jam estas ia komplimento. Mi kutimas demandi: „Ĉu mi rajtas korekti vin?” Ĝis nun mi ĉiam ricevis jesajn respondojn.

Dua rimarko: ĉu ni traktu la korektadon de skribaj taskoj aŭ la korektadon de parolaj esprimoj? Mi traktos ĉi tie la korektadon de skribaj taskoj. En instrua momento, leciono, oni povas supozi, ke la lernantoj deziras progresi kaj atendas, ke la instruisto gvidu, korektu kaj klarigu. Tion li faru. Li ricevas paperon, kie lernanto skribis tekston en fremda lernata lingvo; povas esti traduko, povas esti respondo al demando, povas esti verkado... Povas esti, ke la instruisto prenis kajerojn hejmen kaj korektas hejme; povas esti, ke tiu ekvido de skriba produktaĵo okazas en la klasoĉambro kun

la verkinto staranta apud la skribotablo de la instruisto. Jam la instruisto ektenas ruĝan skribilon kaj ek al...

Certe plej ofte la instruisto forstrekas troajn literojn aŭ aldonas mankantajn. Plej bone li plie substreku la vorton por altiri la okulojn de la lernanto al tiu loko. Povas esti, ke la instruisto uzas sagojn, por meti iun vorton al ĝia ĝusta loko en la frazo. Por tiaj korektoj estas kompleta kodo. Tamen pro la nuntempaj korektebloj enkomputilaj, tiu farmaniero iom post iom malaperas. Do post la momento, kiam la instruisto vidis, legis kaj korektis la tekston, la teksto aperas ĝusta, sed grandparte dukolora. En tiu momento plej bone la lernanto kopiu la tekston denove, por vidi belan skribaĵon seneraran. Tion li legu kaj legadu, tiel li progresos.

Estas aliaj ebloj. Bonvole pripensu.

Kelkfoje mi nur substrekis la lokojn, kie eraro aperis. Mi poste redonis la dokumenton al ĝia aŭtoro. Tiu ĉi verkinto devis mem trovi la erarojn, pripensi pri finaĵoj mankantaj, eraraj, ... La lernantoj montris ofte, ke ili ne ŝatas tiun metodon. Jes fakte, ili preferas, ke la instruisto faru la laboron mem! Sed esplorante pri la indikitaj lokoj en sia teksto, ili vere aktive pripensas pri la lingvo kaj ties reguloj kaj progresas. Sed mallaboremo ofte aperas... pigreco venas...

Kelkfoje mi estis ankoraŭ pli ruza: post tralegado kaj silenta sumado de eraroj mi nur anoncis, kiom da eraroj mi trovis en la teksto. Grrrrrrrrrrrrr..... La lernantoj protestis silente sed videble! Dekkvinjaruloj ne ŝatas tian metodon! Tamen mi scias, ke tiel ili plej bone lernas. Ili devis revizii sian tekston de a ĝis z atenteme. Foje ili aldonis erarojn. Post momento ili revenis, por submeti sian tekston al mi duan fojon. Denove mi indikis la novan nombron da eraroj; plej ofte la nova nombro estis malpli alta ol la unua. Denove ili reiris al sia sidloko por pli profunde analizi ĉiun vorton. Oni povus fari tion eterne, sed tion oni ne faru, ĉar la lernanto perdus kuraĝon. La instruisto devas flari la momenton, kiam la lernanto kun forta suspiro ĉesos rigardi sian tekston. La instruisto ĉesu antaŭ tiu momento, ĉar lia ĉefa celo devas esti, ke la lernanto havu motivon por lerni. Do se la motivo estas forta, la instruisto povas diri la eraronombron trifoje, kvarfoje... Sed alikaze la instruisto helpu al la lernanto montrante la lokojn, kie la lernanto devas modifi ion.

Ĉiam la anonco pri eraro okazu pozitive. Se la instruisto diras: „Denove vi forgesis akuzativon!” tio malkuraĝigos la lernanton. Eblas anonci la samon dirante: „Vere akuzativo estas malfacila punkto por francelingvanoj...” „Kun akuzativo tie via frazo estos ĝusta!” Instruistoj devas nepre pripensi pri tiaj pozitivaj frazoj kaj uzi ilin. Tio plej gravas psikologie en la rilato instruisto-lernanto. Pensu, ke japana majstro dum sia instruado ne rajtas uzi la vorton „Ne”! „Faru pli bele tiel!” diris al mi mia aikido-majstro montrante denove la teknikon, kiam mi tute fuŝe provis fari ĝin.

Ĉi tie mi traktis korektadon de eraroj. Se temas pri stilaj plibonigoj, plej bone eku diskuto inter la lernanto kaj la instruisto. Stilo estas eblo esprimi sin libere ene de la ĝustaj esprimmanieroj de la lingvo; do temas pri persona emo, gusto. Ne estas striktaj reguloj respektendaj.

Mi kutimis kontroli verkaĵon uzante la ruĝan koloron por eraroj kaj la verdan koloron por aparte belaj esprimoj. Ni estu pozivitaj! La trafiklumoj al kutimigas nin al bremsado ĉe ruĝa koloro kaj elano ĉe verda koloro. Ĝojigas min, ke la tri koloroj de la trafiklumoj estas la tradiciaj afrikaj koloroj, ĉar afrikdevena usonano Garret Morgan inventis ilin. Vidu! Mi mem suferas pri tiu instruista trajto: mi ne maltrafas okazon instrui ion al iu....;-)

La korektado de parola produktaĵo estas pli tikla. Mi traktos ĝin en alia artikolo.

Renkontoj kun Diferenculoj: Rakontoj por Interkultura Edukado, verkita de Przemysław Paweł GRZYBOWSKI, disponebla ĉe Edukado.net, kaj Amazon.com

Recenzo de Dennis KEEFE, Universitato de Florida Atlantic, Usono

Multe da Esperantaj gepatroj interesiĝas pri libroj en la Internacia Lingvo, kiuj taŭgas teme kaj nivele por iliaj infanoj. En Esperantujo dum la lasta jarcento ekaperis multe da diversaj libroj por junaj lernantoj niaj. La plejparto de tiuj Esperantaj verkoj por infanoj temas pri rakontoj aŭ fabeloj. En ili ofte abunde troviĝas allogaj bildoj, kaj depende de la verko, malmulte aŭ multe, aŭ eĉ multege da teksto. Gepatroj utiligas tiujn libretojn kaj librojn kelkfoje por instrui la lingvon, kaj kelkfoje por instrui pri la vivo

mem. Kaj ĝuste pri tiu temo, lerni pri la vivo mem, troviĝas nova, bone verkita libro de Przemysław Grzybowski, nomata *Renkontoj kun Diferenculoj: Rakontoj por Interkultura Edukado*. Gepatroj, kiuj volas, ke iliaj infanoj ne nur lernu Esperanton, sed ankaŭ lernu pri homoj kaj toleremo, kaj specialaj pri tiuj homoj, kiuj diferenciĝas de la socia normo, certe ŝatos utiligi tiun bone verkitan libron.

Kiel diras la titolo, la libro pritraktas Diferenculojn (ĉiam skribita en la libro kun majusklo). Kio estas Diferenculoj? Estas personoj, laŭ la aŭtoro, “kiuj pro diversaj kialoj distingiĝas en la socio. Oni ofte perceptas ilin kiel strangajn, malkutimajn, kaj pro tio oni ofte interesiĝas pri ili kaj klaĉas, kreante pri ili stereotipajn opiniojn.” Do tia kategorio de homo povas ankaŭ enhavi esperantistojn, kaj efektive, la avo de la ĉefrolulino de la libro estas membro de nia verda rondo. La avo uzadis sian lingvon por ĉirkaŭvojaĝi la mondon kaj fariĝi ankaŭ poligloto. Sed ne pensu, ke la libro turniĝas ĉirkaŭ la verda standardo; ĝi pritraktas esperantistojn nur iomete, kaj fokusiĝas ĉefe ne pri lingvaj diferencoj, sed pri homoj, kiuj estas mistaksataj kaj miskomprenataj pro diversaj kialoj. La temoj en la libroj estas variaj: korpaj kaj fizikaj malsanoj, maljuneco, memoroperdo, ksenofobio, religiaj diferencoj, diskriminacio kontraŭ samseksemuloj, handikapo, senhejmeco, kancero kaj morto, holokaŭsto, diskriminacio, rifuĝintoj, inter aliaj.

Ĉiu el la 17 mallongaj sed informriĉaj ĉapitroj turniĝas ĉirkaŭ unu aŭ paro da Diferenculoj vidataj tra la okuloj de Kamila, kelkjara infano, akompanata de siaj gepatroj aŭ parencoj; ŝia avo, kiel dirite, estas esperantisto. Kamila scivolas pri tiuj homoj, kiujn ŝi renkontas dum sia ĉiutaga vivo, kaj ŝiaj familianoj helpas al ŝi kompreni, ke kvankam tiuj homoj diferenciĝas de la socio, en kiu ni vivas, tiuj Diferenculoj meritas nian plenan komprenon kaj estimon. Kamila lernas pri ili, kaj pro tio ankaŭ pri si mem kaj pri la mondo, en kiu ŝi vivas.

Ĉie en la libro videblas, ke la aŭtoro estas bona konanto de infanoj kaj la mondo. Fakte li ne nur estas tia, li estas doktoro pri pedagogio, kaj estas fakulo pri interkultura kaj kompara edukado. Li bone konas sian temon kaj bone esprimas sin tra la ĉefrolulino de la libro, la infano Kamila. Esperantujo havas bonan ŝancon, ke nun estas profesia kaj talenta pedagogo, Doktoro Grzybowski, kiu verkas eduke, didaktike kaj pedagogie por niaj infanoj. La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, ILEI,

bezonas ĝuste tiajn homojn, se ni volas komenci havi pli da efiko sur edukaj instancoj en Eŭropo kaj aliloke.

La libro estas verkita por infanoj inter la aĝoj de ses kaj dek jaroj, tamen la aŭtoro indikas, ke gepatroj povas utiligi la libron, speciale partojn de ĝi, ankaŭ por pli junaj lernantoj. Ĉio dependas de la matureco de la infano mem, de la medio, en kiu la infano troviĝas, kaj de la emo de la gepatroj klarigi certajn temojn. Mi dirus, tamen, ke la libro povas servi ankaŭ al plenkreskuloj. En la kazo de adoltoj, pli maturaj homoj povas pridiskuti la libron en malgranda rondo, prikomentante la temojn pri miskompreno kaj diskriminacio, aldonante vivdetalojn, kiuj devenas de la longa kaj varia sperto de la plenkreskulo. Infanoj kaj plenkreskuloj, kiuj aprecas la bildan parton de infanaj libroj, certe ŝatos la kreive kaj lerte desegnitajn ilustraĵojn faritajn de Lucyna FIC. La ilustranto sukcese aldonas desegnaĵojn por ĉiu ĉapitro de la libro kaj kreas parton de la etoso, kiu estigas kompletan lernomomenton por la legantoj.

Resume, ĉi tiu nova libro estas bona aldono en nia Esperanta biblioteko por infanaj libroj. Ĝi havas bonan lingvan stilon kaj interesajn familiajn renkontojn kun homoj, la Diferenculoj, pri kiuj ni informiĝas. La infanoj, kiuj lernas de ĉi tiu libro, komprenos pli bone, kiel ekkoni diversajn homojn tra sia infanaĝo, kaj ili lernos, kiel iĝi pli bonaj civitanoj en iom pli bona socio. La gepatroj, kiuj trairos la ĉapitrojn de ĉi tiu verko kune kun siaj gefiloj, lernos ankaŭ pri siaj infanoj kaj pri si mem. Leginda kaj priparolinda libro, kaj bona aldono al infana literaturo verkita, ne tiom por lerni lingvon, sed por lerni pri la vivo, pri tio kiel alfronti diskriminacion kaj kiel estigi socion de toleremo.

*ĈU VI ATENTE LEGIS VIAN REVUON?
ĈU VI POVAS DIRI, EN KIOM DA ARTIKOLOJ ONI PAROLAS PRI AMO?
SE VI NE POVAS DIRI, VI DEVAS ĈION RELEGI!!*

Informoj pri ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prezidanto), Mónica Molnár (vicprez.), Mireille Grosjean, Leyeester Miro, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Tiekō Isikawa, Ana Montesinos de Gomis.

Kontrolo: Simon Smits, Orlando Raola.

Lernej: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi. Estrare: Penny Vos.

Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: Mireille Grosjean.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Ilona Koutny, Bharat Ghimire, Radojica Petrović, Kristin Tytgat. Estrare: Gong Xiaofeng „Arko”..

Enmovadaj partneroj (entute 14)

EEU: *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, *cantskog@kolumbus.fi*.

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Viťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, *info@ikso.net*. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj
Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74. NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando.
Retadreso: *redaktanto@edukado.net*.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49)55215983, Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, *zsafia.korody@esperanto.de*.

IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio)

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Petra Smidéliusz**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, *www.uea.org*.
Reprezentanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI:
Stefan MacGill.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE (*Asocio de lingvaj testistoj de Euro*po) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**,

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek**, **Ron Glossop**, **Leyster Miro**.

Unesko (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, *monique.arnaud@aliceadsl.fr*; **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60.

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 20 € en A-landoj (laŭ UEA-difino), **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj**, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. **Kun aliro nur al la reta versio de IPR membreco kostas 10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj.** Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna amiko* akceptas abonojn enlande. Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA,

P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Bv klare indiki la celon de via pago.

La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de IPR sen membreco: 24 €. Reklamtarifoj por IPR: 180 € por plena, 110 € por duona kaj 70 € por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

Redakciaj informoj

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Iwona KOCIĘBA, *Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem*. **Presado**: Flandra Esperanto-Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio*, tel: (+32-3)-234 34 00. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, <jozefo.nemeth@gmail.com>, <http://www.ilei.info/ipr/>; tel: (+36-70) 931-0530. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk*, <moerbeekr@gmail.com>.

**Ni fermis la nunan numeron la 15-an de aprilo 2015,
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de aŭgusto 2015.**

Jen kelkaj eblaj lokoj (*vd dekstre*), kie nia Konferenco en 2017 povus okazi. Pri tiuj landoj kaj urboj vidu detalojn en www.eo.wikipedia.org.

Pliaj fotoj vidiĝas pri Rufisko, Senegalo:

<http://mirejo3.blogspot.ch/2015/04/rufisko-senegalo.html>;

pri Thiès, Senegalo: <http://mirejo3.blogspot.ch/2011/02/thies.html>;

pri INFA de Tove, Kpalimé, Togolando:

<http://mirejo3.blogspot.ch/2015/01/infa-de-tove-kpalime-togo.html>;

pri Instituto Zamenhof, Lomeo, Togolando:

<http://mirejo3.blogspot.ch/2015/01/togo.html>.

Instituto Zamenhof, Lomeo, Togolando



INFA de Tove, Kpalimé, Togolando



CCDD, Thiès, Senegalo



CNFA, Rufisko, Senegalo



